Jen do la problemo : por la sukceso de sia lingvo, la esperantistaro (espereble nur parteto) ne volas aŭdi pri la angla, ne ŝatas tradukojn de « herezaj » – siavidpunkte – verkoj.
Nu … finfine … kiam do iĝos plenmatura nia kara medio ?
Kiam do ĝi kondutos kiel komunumo de iu ajn alia lingvoparolantaro ? Ĉu la Tagon de Sankta Neniamo ?

En la sama dissendolisto, feliĉe, konata esperantisto, François Lo Jacomo, atentigis nin pri la danĝeroj de tiaj reagoj :
« Mi pridemandis Henri Bareil, kiu delonge zorgas interalie pri recenzoj por la revuo de matematikinstruistoj (Bulletin de l'Association des Professeurs de Mathématiques de l'Enseignement Public), kun plurmil abonantoj, kion li opinias pri tradukado de tiuj verkoj, kaj jen lia tre klara respondo :

Pour J.-P. Petit, ses albums étaient très bien. Je ne vois pas en quoi le fait, pour Petit, d'avoir ensuite divagué sur les ovnis, doit discréditer les personnes ou les associations qui s'intéresseront aux très bons Anselme Lanturlu. Les jugements critiques dont tu me parles me semblent ***désagréablement globalisants, inutilement intolérants, abusivement paralysants et lamentablement appauvrissants pour l'espéranto.*** *On n'a pas tous les jours la chance d'avoir des ouvrages de vulgarisation aussi délectables ... »*

Jen rimarkoj plenaj je **saĝo** kaj **toleremo**, kiuj povus, eĉ devus, pripensigi nin ĉiujn.

- Pascal VILAIN -

Vera komika dramo.

Micheline neniam havis bonajn dentojn. Ekde kiam ŝi estis malgranda, ŝiaj dentoj estis malfortaj. Ĉiuj kariiĝis, tamen, ŝi neniam estis manĝinta tro da bombonoj kaj ŝi brosis la dentojn ĉiuvespere. Sed iom post iom, la dentisto devis ilin eltiri kaj finfine, anstataŭigi per falsa dentaro.

Ĉi tiun jaron, ŝi decidis vojaĝi al Lourdes. Estis pilgrimo por danki Marian pro multaj kialoj, precipe pro la trovo de tiel bona dentisto kiu tiel bone aranĝis ŝian buŝon. Sed la falsa dentaro iomete dolorigis ŝin. Ŝi iros konsulti la dentiston tuj kiam ŝi revenos. Ŝi vojaĝis al Lourdes kun grupo, per trajno kiu ne estis TGV, en kiu oni ankoraŭ povis malfermi la fenestrojn. Micheline ekemis manĝi pomon. El sia sako, ŝi eltiris pomon, tranĉilon kaj paperan buŝtukon kiun ŝi sternis sur siajn genuojn. Ĉar la falsa dentaro dolorigis ŝin, ŝi eltiris ĝin el sia buŝo kaj metis ĝin sur la buŝtukon.